



# Verda Dueto

Li Yuping: Pri la Pasintaj Aferoj

Guozhu: Virga Aŭskulto por la Virga E-elsendo

2010 Ĉinio



## Verda Dueto

Li Yiping: Pri la Pasintaj Aferoj

Guozhu: Virga Aŭskulto por la Virga E-elsendo

## Verda Dueto

Pri la virga verda elsendo  
ĝis nun ni ankoraŭ memoras.  
La voko arĝente sonoras  
tra vasta ĉina firmamento

al oriento, okcidento.  
Aŭskultantoj pie adoras  
Pri la virga verda elsendo  
ĝis nun ni ankoraŭ memoras.

Ni skribas mem pri la evento,  
kiu ne nur por ni valoras,  
ankaŭ historie trezoras,  
ĉar ĝi jam fariĝis legendo,

la virga rekorda elsendo!

### 诉衷情

往事悠悠重回首，绿色二重奏。  
屈指四十五年，激动仍依旧。  
最难忘，知己友，世无俦。  
首次收听，午夜相守，情深谊厚。



## **Pri la Pasintaj Aferoj**

### 往事悠悠

Tempo flugas. En palpebrumo la Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia 45-jariĝis. Mi estas tre feliĉa ke mi propramane helpis ĝian naskiĝon kaj kontribuis al ĝia kreskado ekde 1962 ĝis kiam mi emeritiĝis en 2000, dume ĝi propraokule vidis kiel mi fariĝis blankhara de junecplena. Kompaktiĝinte tiu historio estas sola linio kun nur kelkaj ideogramoj en mia karier-tabelo, kaj sterniĝinte ĝi estas bunta kaj ĉarma pentraj-volvo en mia koro.

时光飞驰。转眼间中国世界语广播45周年了。我深感幸福的是，从1962年到我2000年退休这一段日子里，我亲手帮助了她的诞生，为她的成长作出了我的贡献，而她也亲眼见证了我从青春到白头。这段历史，浓缩起来，是我履历表上的一栏，寥寥数字；展开来，

是我心里一幅色彩斑斓的画卷，难舍难忘。

La pentraĵo estas desegnita ekde 1962, kiam mi studis en ĵurnalisma fakultato de Pekina Brodkasta Instituto (nuna Pekina Komunikada Universitato). En iu printempa tago mia instruisto alvokis min kaj proponis en la nomo de estraro, ke mi forlasu la ĵurnalisman fakon kaj ekstudu Esperanton por la starigota Esperanta disaŭdigo de Ĉinio. Mi konfuziĝis ĉar mi neniam aŭdis la nomon Esperanto antaŭ tiu tago. Cetere mi ŝatis ĵurnalismon kaj songis esti senbrida raportistino. Tamen finfine mi akceptis la proponon ĉar, laŭ juna mi, la bezono de la ŝtato estas la unua. De tiam mi firme ligis min kun Esperanto kaj neniam disiĝis de ĝi.

画卷的起点是1962年，我正在北京广播学院（现在的北京传媒大学）新闻系就读。一个初春的日子，班主任约我谈话。并且以领导的名义向我提出，放弃我正在读的新闻专业，为了国家将要新办的世界语广播去改学世界语。我脑子乱成一锅粥，因为在这一天之前，我从来也没有听说过世界语这个名字。但我最终还是接受了这个决定。因为，作为一个共青团员，国家的需要是第一位的。从此，我的生命就同世界语紧密联系在一起，再也不曾离开过她。

Nelonge poste oficiale fondiĝis la Esperanta kurso en Pekina Brodkasta Instituto. Tute eksteratendite ni kvar gestudentoj de la kurso fariĝis fokuso de miloj kaj miloj da esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj, ĉar tiu kurso estas la unua Esperanta kurso sub regula alta lernejo ekde 1887, kiam publikiĝis la Unua Libro de Esperanto, kaj sekve de tio, ni gajnos la unuan oficialan diplomon de Esperanta fako de alta lernejo en la mondo.

不久以后，北京广播学院的世界语班就正式成立了。出人意料的是，我们四个学生成了国内外千万世

界语者瞩目的对象。因为自世界语1887年诞生以来，这是第一个在正规大学设立的世界语班，我们将是中外世界语者中第一批具有正规大学学历的世界语者。

Mi komencis gajan kaj diligentan lernadon de Esperanto. Mia instruisto estas ĉina veterano Venlo Feng. Ekde la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento sinjoro Feng jam dediĉis sin al Esperanto-instruado kaj kulturis sennombrajn esperantistojn. El ili nemalmultaj fariĝis elitoj de la ĉina Esperanto-movado. Somere de 1963, fininte la lernadon mi kaj alia kunlernanto estis senditaj al Radio Pekino (nuna Ĉina Radio Internacia) por prepari la Esperantan disaŭdigon. Dum tiu periodo ni ricevis varman helpon de multaj samideanoj ĉinaj kaj alilandaj, precipe de Ĉina Esperanto-Ligo kaj de Esperanta Redakcio de Pola Radio. Post malpli ol unu jaro venis al ni tri novaj samideanoj, kiuj lernis Esperanton iom pli malfrue. Ni kvin gejunuloj formis Esperantan Redakcion de Radio Pekino.

我开始了快乐而勤奋的世界语学习生活。我们的老师是中国的世界语元老冯文洛先生。从上个世纪三十年代起冯先生就献身于世界语教学工作，培养了众多的世界语人才，其中不少人都成为了中国世界语运动的精英。

Apliki Esperanton al internacia disaŭdigo estis longa deziro de maljuna generacio de ĉinaj esperantistoj. Por tio ili faris multjaran klopodadon kaj eĉ persone provfaris disaŭdigon por konfirmi la aŭdeblecon. Heredante ilian idealon kaj sindonemon ni faris signifoplenan, kompreneble tre malfacilan laboradon, kaj finfine realigis ilian songon.

运用世界语作国际广播，是中国老一代世界语者长期以来的愿望。为此他们进行了多年的努力，甚至于亲自试播来验证收听的效果。继承了他们的

理想和奉献精神，我们进行了充满意义、当然也是非常困难的工作，终于实现了他们的梦想。

La kvara horo frumatene de la 19-a de decembro, 1964, estas la momento memorinda por ĉiam. La voĉo de ĉinaj esperantistoj la unuan fojon sonoris en la firmamento. Bonŝanĉe mi kaj mia kolego sinjoro Liu Junfang kune faris la unuafojan paroladon. Tio malfermis la novan etapon de la historio de ĉina internacia disaŭdigo kaj de ĉina Esperanto-movado.

1964年12月19日凌晨4点，是一个值得永久纪念的时刻。中国世界语者的声音传到了太空。很幸运的是，我和我的同事刘俊芳先生作了首次的播音，开启了中国国际广播史和中国世界语运动史上一个新的阶段。

Tiu epokfaranta afero tuj vekis aplaŭdon en monda esperantujo. Kvankam ne estis grandskala inaŭgura anonco, tamen multaj esperantistoj kaptis nian programon kaj senprokraste sendis al ni varman eĥon. Nur kelkajn tagojn post la unua disaŭdigo atingis nin la unua letero, kiun adresis el Moskvo sinjoro Nguyen Van Guong, membro de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj ambasadoro de Vjetnamio al Sovetunio. Unu monaton poste flugis al ni 17 leteroj sinsekve el 9 landoj: Vjetnamio, Federacia Germanio, Sovetunio, Japanio, Usono, Belgio, Pollando, Finnlando kaj Nederlando.

这一个划时代的事件在国际世界语界立即引来喝彩。尽管我们没有作大规模的开播预告，然而许多世界语者还是收听了我们的节目并且毫不迟缓地给我们寄来了热烈的回响。首播后只有几天，我们就收到了第一封听众来信，那是越南劳动党中央委员阮文镜先生从莫斯科寄来的。一个月后，我们共收到了十七封信件，来自九个国家：越南，联邦德

国，苏联，日本，美国，比利时，波兰，芬兰和荷兰。

Aparte kortuŝis min tio ke ankaŭ en Ĉinio troviĝas niaj fidelaj aŭskultantoj ekzemple sinjoro Hu Guozhu. En la soleno de 45-jara jubileo de Esperanta disaŭdigo de ĈRI, sinjoro Hu rakontis per PPT kiel li konkeris neimageblajn malfacilojn por kapti nian disaŭdigon kaj kiel li persistis en la aŭskultado ĝis nun. Lia parolado surprizis la ĉeestantaron. Kiel konate komence ni disaŭdigis la programon nur unufojon semajne, je frumatena kvara horo, nur al Eŭropo per mallongaj ondoj, tial estas tre malfacile kapti la programon en Ĉinio. Por tio necesas saĝo, diligenteco, obstineco, bona radio, kaj plej grave, arda amo al Esperanto.

特别令我感动的是，在中国也有我们忠实的听众，例如胡国柱先生。在中国国际广播电台世界语广播45周年的庆祝会上，胡先生用幻灯片向我们讲述了，他是如何克服了难以想象的困难才收听到我们节目并且坚持至今的。他的讲话使得所有在场的人都感到惊讶。因为在刚开播那个时候，我们每周只播音一次，在凌晨四点，只用短波向欧洲播音，因此在中国国内要想收听到，那是极其困难的。为此需要有智慧，勤奋，执着，良好的收音机，最重要的，是对世界语的热爱。

Poste venis al ni pli kaj pli multaj leteroj. La skribintoj montris ne nur amon kaj laŭdon, sed ankaŭ sugeston kaj deziron. Ili prenas nian programon kiel fenestron por koni Ĉinion. Ili metas sian esperon kaj idealon sur nian disaŭdigon. Multaj el ili ofte diris la samajn vortojn “via disaŭdigo estas ne nur via, sed ankaŭ nia”. Ili laŭeble donis al ni multajn plenfortajn kaj senegoismajn helpojn. Ĝuste kun ilia helpo kaj subteno, nia afero senĉese disvolviĝas kaj nia influo

senĉese vastiĝas. Nun la Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia ĉiutage direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nord-orienta Azio kaj Sud-orienta Azio. Cetere ĝia reto favorigas diverslandajn samideanojn aŭskulti la programon libere je tempo kaj loko. Kun ĉio ĉi tio la Esperanta Redakcio de ĈRI ludas pli kaj pli gravan rolon en Esperantujo.

后来我们收到了愈来愈多的听众来信。寄信人不仅表达了热爱和赞扬，还表达了建议和愿望。他们把我们的广播视为了解中国的窗口。他们把自己的希望和理想寄托在我们的广播上。有许多听众经常讲着同样的话：“你们的广播不仅仅是你们的，也是我们的。”他们尽可能给我们全力而无私的帮助。正是有了他们的支持和帮助，我们的事业才不断地发展，影响不断扩大。现在中国国际广播电台每天向欧洲、拉美、东北亚和南亚各有一个小时的世界语广播。此外它的网站也为各国同志不限时间地点自由收听节目提供了方便。由于这一切，国际台的世界语部在世界语国度起着越来越重要的作用。

Retrorigardante la pasintecon mi sentas min tre feliĉa ke en pli ol 40 jaroj mi amikiĝis kun tiel multaj aŭskultantoj kaj mi ĉiam estis brakumita de amikeco. Mi ne povas forgesi mian esperantistan vojaĝbapton. Tio okazis en 1975. Invitite de la Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio, la ĉina Esperanto-delegacio faris dusemajnan viziton al Vjetnamio. Kiel unu el la tri membroj de la delegacio, mi rikoltis profundan amikecon de vjetnamaj samideanoj. Ili varme akceptis nin malgraŭ tio ke ilia patrolando ĵus finis la militon kaj reunuiĝis antaŭ nelonge. Mi havis la honoron intervidiĝi kun nia unua aŭskultanto sinjoro Nguyen Van Guong. Tiam li jam forlasis la ambasadoran oficon en Moskvo kaj sin okupis kiel estro de la departemento pri ekstera ligo sub la Centra Komitato de la Labora

Partio de Vjetnamio. Sinjoro Dao An Kah, fama poeto kaj prezidanto de la Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio, akompanis nin en la tuta vojugado kaj zorgoplene aranĝis ĉiujn niajn tagordojn.

回首往事，在四十多年的时间里，我结交了这么多的听众朋友，总是被友谊所包围，为此我感到非常幸福。我忘不了我的世界语之旅。那是在1975年，应越南保卫世界和平世界语协会的邀请，中国世界语代表团对越南作了两个星期的访问。作为三人代表团的成员之一，我收获了越南同志们的深厚友谊。他们的国家刚刚结束战争，不久前才获得统一。对我们给予了热情的接待。我有幸与我们的第一位听众阮文镜先生会见。当时他已经离开了驻莫斯科的大使岗位，担任了越共中央对外联络部部长。著名的诗人、越南保卫世界和平世界语协会总书记陶英柯先生全程陪伴我们，精心周到地安排了我们的所有行程。

Mi ne povas forgesi la simpozion kun la temo “Esperanto en Radio”, okazigitan en la urbo Osijek de tiama Jugoslavio en 1985. Tio estis mia unuafoja kaj tute sola oficevojaĝo al Eŭropo. Invitite de afablaj jugoslavaj aŭskultantoj, en dek tagoj antaŭ kaj post la simpozio mi faris stafetan vojaĝon laŭ Jugoslavio kaj gastis ĉe amikoj de 7 urboj. En la norda landlima urbo Subotića mi vizitis faman mondvojaĝiston Tibor Sekelj, ĝuis liajn riĉajn artaĵojn kolektitajn en diversaj anguloj de la mondo kaj dividis liajn mirindajn travivaĵojn en aventurado.

我忘不了1985年春天在南斯拉夫沃西耶克市举行的以“世界语在广播中的应用”为主题的国际研讨会。这是我第一次单独赴欧洲出差。应南斯拉夫听众的邀请，我在会议前后的十天之中，沿着南斯拉夫作了一次“接力”旅行。在七个城市的世界语

朋友们家里作客。在北部边陲城市苏博提查我拜访了著名的世界旅行家迪波尔·塞凯尔先生，参观了他世界各地的收藏，也分享了他令人惊叹的冒险经历。

En suda ĉemara urbo Pula mi gastis ĉe nia sincera amiko doktoro Ivo Borovečki, aŭskultis lian bravaĵon en la naciliberiga milito kiel partizano, legis liajn multajn memorlibrojn kun varmaj skribaĵoj de liaj ĉinaj amikoj altrangaj kaj ordinaraj, kaj kortuŝiĝis de lia plena amo al nia disaŭdigo.

在滨海城市普拉，我访问了我们的老朋友伊沃·博洛维茨基博士，听他讲述在民族解放战争时当游击队员的英勇经历，阅读他的许多纪念册，其中有许多中国朋友（从政要到普通人）的留言题字。我为他对我们广播的热爱而感动。

Mi ne povas forgesi mian raportadon pri la Internacia Esperanta Arta Festivalo en antaŭa Sovetunio kaj memorindan renkontiĝon kun niaj aŭskultantoj en la urbo Riga de Latvio. Mi ankaŭ ne povas forgesi la penigan raportadon pri UK en Aŭstralio. En tiuj okazoj mi akiris varman helpon kaj plenfortan subtenon. Kompreneble mi ankaŭ ĉiam memoras tiujn samideanojn kiuj venis al Ĉinio de diversaj partoj de la mondo. Kiel gastiganto mi laŭeble afable akompanis ilin, por ke ili profunde konu Ĉinion kaj la vivon de ĉinaj popoloj. Ĝenerale ili hejmeniris kontente kaj impresplene.

我忘不了我作的对前苏联国际世界语艺术节的报道，还有在拉脱维亚里加城与我们的听众们难忘的会见。我也忘不了对于在澳大利亚举行的国际世界语大会所进行的努力的报道。当然我永远记得从世界各地来中国访问的同志们。作为东道主，我尽可能亲切地陪伴他们，让他们更深入地了解中国和

我国各族人民的生活。通常他们都能够满意而归并且留下深刻的印象。

Inter miaj amikoj menciindas ankaŭ la ĉinaj. Ili diligente kaj persisteme sin oferas al Esperanto-movado, plenforte aplikas Esperanton al konigo de Ĉinio, al akcelo de ĉina ekstera komerco, al semado de amikeco kaj tiel plu. Ili starigas bonan modelon por mi.

在我的许多友人中，中国的朋友们也是很值得一提的。他们勤奋而且执着地为世界语运动作奉献。为了让世人了解中国而运用着世界语，为了促进中外贸易，为了散布友谊而运用世界语。他们为我树立了良好的榜样。

Nun aparte ĝojigas min tio ke kreskas la juna generacio de Ĉinio. Ili estas saĝaj kaj diligentaj, havas altan idealon kaj montras sin talentaj en praktikado. Mi kredas ke ili transprenos la torĉon de niaj antaŭuloj kaj kontinue kondukos la ĉinan Esperanto-movadon al pli alta stadio.

如今格外令我感到高兴的，是中国的年轻一代成长起来。他们聪明又勤奋，有着高尚的理想，在实践中表现出自己的天才。我相信他们能够接过前辈的火炬，把中国的世界语运动推向更高的阶段。

Por ĉio ĉi mi kore dankas al la sorto, kiu kondukis min al Esperanto kaj faras mian vivon riĉa kaj signifa.

为了这一切，我要衷心感谢命运，它将我引向世界语，并且使我的生活富有意义。

Li Yuping 2010-02-20 en Pekino  
李玉萍2010年2月20日于北京



Guozhu:

## **Virga Aŭskulto por la Virga E-elsendo**

当时收听不寻常

- Rememoro pri CRI en la Sorĉa Momento  
1964-12-19
- 收听CRI首次世界语广播的回忆

Aŭskulti programojn de radio, eĉ en la pasinta jarcento, estas tre banala ĉiutagaĵo laŭ ĉies sperto. Nenio mirinda, sekve neniom menciinda. Siatempe, en nia socia vivo abundas disaŭdigoj de diversaj radiostacioj, ne nur la centra (ŝtata), sed ankaŭ provincaj, urbaj kaj de plej diversaj entreprenoj. Multaj fabrikoj, lernejoj ks funkcias siajn proprajn brodkastejojn, ĉu grandajn aŭ negrandajn. Laŭparoliloj dissemiĝas ĉie videblaj. Iliaj disaŭdigoj komenciĝas ekde la mateno, vekante nian ellitiĝon, akompanante nin en matena gimnastiko kaj adiaŭis ĝis nia endormiĝo. Ni povas facile aŭdi diversajn programojn ĉiavetere, eĉ sen radioricevilo.

按常理, 即使在上个世纪, 收听电台的新闻广播, 也是一件再平凡普通不过的事情。当时的社会生活中, 不但有国家的, 省市的广播, 各个企事业单位还有自己的广播室、广播站、广播台, 他们用高音喇叭转播的新闻, 从清早伴我们起床, 做广播体操, 一直到天黑熄灯就寝。不用收音机, 我们也能够全天候地听到各种各样的广播节目。

Tamen, en Ĉinio 1964, aŭskulti Esperanto-elsendon de CRI (siatempe Pekina Radio) ne estas facila afero. Por atingi tiun celon, estas kvar kondiĉoj anticipe necesaj, nemankigeblaj:

可是, 在1964年的中国, 要想收听CRI世界语广播, 并不容易。为了达到这个目的, 至少要满足四个方面的基本要求, 缺一不可:

1. Informo: Anticipe scii pri la okazonta E-elsendo, pli bone ankaŭ pri la horaro.

2. Aŭdkapablo: por kompreni plejparton de la disaŭdigo.

3. Radioricevilo: kiu povas ricevi programon je la mallonga ondo.

4. Ĉirkonstanco: relative sekura loko por aŭskulti en neĉina lingvo.

- 1.资讯：事先要知道有这样的广播，最好能有必要的节目时间表。
- 2.听力：要大体能够听懂广播的内容。
- 3.工具：要有能够接收短波的收音机。
- 4.环境：要有一个相对安全的收听环境。

La suprediritajn kvar kondiĉojn mi pretigis ne per unu tago, sed per iom-post-ioma kompletigo en ĉ. ok jaroj.

以上这四点，我并不是一下子就具备条件的，而是经过了一段不算短的准备时期，前后大约八年，才得以逐步完备。

Koncize do pri tiu jaroko da preparo. 这八年的情况，简而言之如下。

Aŭtune 1956, tre hazarde mi eksciis la nomon de Esperanto. Mi sendis leteron al la <Popola Tagĵurnalo> pridemandi. Ili transsendis mian leteron al Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL). Sub la kompleza helpo de la veteranoj en ĈEL mi komencis memlerni Esperanton en la vintro 1956. Sen instruisto kaj kunlernantoj ĉe mi. Cirkonstanco por izolita memlernanto estas ege malfacila, sed tio vekis mian spitemon kaj deziron: nepre ellernu Esperanton ĝis bona posedo! Mia unua lernolibro <La Plena Kurso de Esperanto> (kompilita de Sheng Guocheng), estas sendita de Estimata Honfan al mi. Por trovi tiun lernilon, li zorgeme serĉadis en pekinaj libro-brokantejoj dum tri monatoj. Tiu malnova lernolibro legiĝis en arkaika ĉina skrib-lingvo. Mi diligente memlernis tri monatojn, finlegis tiun lernilon. Por esprimi mian dankemon, mi skribis dank-leteron en Esperanto kaj sendis al la veterano en Pekino. Kvankam mi jam povas skribi leteron en Esperanto, tamen mi ankoraŭ ne scipovis voĉlegi eĉ la alfabeton de Esperanto.

1956年秋，我在一个非常偶然的情况下得知世界语的名字。写信到人民日报社打听，他们把我的信件转给中华全国世界语协会。在ĈEL老师热情帮助下，从这年冬天开始自学世界语，身边没有老师和同学，学习条件极差。重重的困难反而激励了我的斗志，下决心一定要把世界语学好。我的第一个课本，是ĈEL张闳凡老师花了三个月的时间从北京一家旧书店里淘来的：盛国成编的《世界语全程》。这本书用文言文来讲世界语。我自学了三个月，读完全书。为了表达我的感激之情，用世界语给北京的老师写了一封感谢信。尽管书面上已经达到用世界语写信的程度，可是我却连世界语的字母表也不会念。

1957, post jaroj da vivpaŭzo, ĈEL refunkciiĝis. Ili sendis al mi materialojn por Esp-lernado kaj adresojn de fremdaj esp-istoj. Mi komencis vastan internacian korespondadon. Leteroj el dekkelkaj fremdaj landoj fariĝis raraj filatelaĵoj. Mi mem ne estas filatelisto. Por mi la amikaj leteroj sur paperoj jam sufiĉas. Mi malavare donacis tiujn fremdajn kovertojn kun belaj poŝtmarkoj al iu filatelisto el miaj intimaj geamikoj, kun postulo pri nenia rekompenco.

1957年，ĈEL在暂停了几年以后恢复工作，给我寄来学习资料和外国世界语者的地址。我开始用世界语进行广泛的国际通信。来自十几个国家的信件成为难得的集邮品。我自己不集邮，只保留里面的信件（信笺），就慷慨地把这些贴有外国邮票的实寄封无偿地赠送给我的一位爱好集邮的好朋友。

Mirinda komunecon ekzistis inter mi kaj tiu filatelisto. Ni ambaŭ havas saman familian nomon HU, ni havas saman hejmlokon, ni havas saman laborejon (respektive en tri urboj, en tri fabrikoj, por kelka tempo en sama sekcio, en sama oficejo, kun skribtabloj vid-al-vide starantaj).

我和这位朋友关系不一般：同姓，同乡，同事（先

后在三个不同的城市，三个不同的工厂共事，有一段时间而且是在同一个部门，同一间办公室，两人的办公桌面对面，朝夕相处。)

En okuloj de tiu filatelisto, la fremdaj poŝtmarkoj, kiujn mi donacis al ŝi, estas neaĉeteblaj en Ĉinio, do senpreze valoraj kaj trezoraj. Tiu donaco estas granda favoro kiun ŝi ne povas rekompenci, sekve ŝi prenis la konduton 'ne vorte danki al granda favoranto'. Tamen, kredu, ke en la vivo vere validas la sentenco "Bono estas rekompencata per bono". Poste, dum mia lernado pri Esperanta prononco, tiu filatelisto donis al mi tri ŝlosile gravajn helpojn, ankaŭ netakseblajn per mono. Mi eĉ preferas diri, ke ŝiaj tri helpoj al mi estas legendaj.

因为我的这些邮品在国内拿钱也买不到，是无价之宝，受赠者觉得是大恩，无以为谢，也就取“大恩不言谢”的态度。但是，善有善报的规律在生活中的确是存在的。我后来在学习世界语语音的过程中，得到了此人的三次关键性的回报，同样无法用金钱衡量的，甚至于可说是传奇式的。

Tiu mia samlokano-amikino mem ne estas esperantistino. Tamen ĝuste ŝi instruis al mi la prononcon de la Esperanta alfabeto (1957), aŭdigis al mi la Esperantan parolon de la sondisko Linguafono (1958), kaj helpis min sukcese aŭskulti la unuafojan E-elsendon de Ĉinio (1964).

我这位同乡朋友，本人并不是世界语者，但是，正是她教会了我世界语的发音（1957），让我听到了国外世界语唱片（1958），帮助我成功地收听到了中国第一次的世界语广播（1964）。

Somere de 1957, mia samlokano-amikino havis ofic-vojaĝon al Ŝanhajo. Laŭ mia peto, ŝi vizitis al la ŝanhaja sidejo de la Asocio por Ĉina-Sovetia Amikeco, kie ŝi salutis al la veterana s-ro Xian Xijia (Sanio). Sanio instruis al ŝi la prononcon de la Esperanta alfabeto. Mia samlokano-amikino funkciis kiel "Homo-diktafono".

Reveninte ŝi instruis al mi la prononcon. Ekde tiam mi ne plu restis muta esp-isto kaj povas deklami tekston en Esperanto.

我的这位同乡朋友，1957年夏天到上海出差，按照我的委托，在中苏友好协会找到先锡嘉老师，当面对世界语字母表的发音，然后充当“活人录音机”，回来转授给我，使我从此可以朗读世界语的课文。

1958, elspezinte plejparton de mia monata salajro, mi aĉetis el la Fremdlingva Librejo duplikaton de la Esperanta versio de la sondisko Liguafono. Mi mem ne havas gramofonon. Mia samlokano-amikino havas elektran gramofonon. Sed ŝiahejme en la tuta ĉambro troviĝas nur unu ŝtopilingo. Sekve ni frontas al alternativo: aŭ funkciigi la elektran gramofonon sen prilumo de elektra lampo por la ĉambro, aŭ ni funkciigi la lampon sen aŭdigo de la sondisko per la elektra gramofono. Siatepe estis luna nokto. Mi ne volas atendi ĝis la hela tago de venonta dimanĉo kaj devigis ke ŝi tuj funkciigu por mi la elektran gramofonon. Tiel, en ĉambro plena de milda lunlumo, mi unuafoje aŭdis la taktoplenan Esperanto-parolon el la sondisko.

1958年，我花了大半个月的工资，从外文书店买到一套国外的世界语版灵格风唱片。我自己并没有留声机。我这位同乡朋友家里有一台电唱机，可是只有一个电器插座，要放唱片就不能够用电灯，要照明就不能够放唱片。当时是一个月夜，我不愿意等到下一个星期日的白天，逼着她立马为我放唱片。这样，在充满了淡淡月光的房间里，我第一次听到了从世界语唱片里传出的抑扬顿挫的声音。

1959, mia traduko unuafoje aperis en la revuo El Popola Ĉnio (EPĈ, n-ro 2/1959). Ekde tiam mi havis pli oftan interkomunikiĝo kun Pekino kiel kunlaboranto de la revuo.

1959年，我的翻译稿件第一次在世界语《人民中国报道》（EPĈ当年第二期）上发表。从那时起，我和北京保持着经常的书面联系。

1962, mi kunvokis amikojn kune pasigi Zamenhof-feston, eĉ tute en Esperanto. Ĉijare Ĉinio komencis prepari por la Esperanto-elsendo.

1962年，我约了友人第一次在全用世界语的环境下过柴门霍夫节。这一年，中国开始筹办世界语广播。

1963, EPĈ (ankaŭ en la n-ro 2) publikigis la kunfoton faritan de mi kaj amikoj en Zamenhof-festo 1962. Samjare, Vuhana Esperanto-Rondo (VER) fondiĝis en 1963-04-05. Mi sendis kontribuojn al ili de alia provinco, kaj tiel havis interkomunikiĝo kun VER. Samjare en 1963-07-25, okazis en Pekino la Unua Ĉina Kunveno pri Esperanto-Laboro. Mi ricevis oficialan invitilon; tamen, pro la malpermeso far la estro de mia fabriko, mi ne povis ĉeesti la sopiratan kunvenon. Marŝalo Chen Yi donis sian faman parolon pri Esperanto-laboro en la kunveno, kiu multe kuraĝigis al ni ĉinaj esp-istoj.

1963年，《人民中国报道》（也是当年第二期）上发表了我和友人在1962年柴门霍夫节的合影。这一年的4月5日，武汉市世界语小组VER正式成立，我从外地向他们的刊物投稿，VER与我取得了联系。同年7月25日，第一次全国世界语工作座谈会在北京举行，我接到了邀请函。可是因为厂长不准假，我未能出席。陈毅副总理在这次会议上发表了鼓舞人心的著名讲话。

Tiel, de la tri kanaloj de veterano-instruistoj, amikoj kaj revuo(j) mi sufiĉe frue informiĝis pri la aperonta Esperanta disaŭdigo de Ĉinio. Tiam ĉinaj esp-istoj reciproke transsendis la ĝojigan informon, kiu vekis ĉe mi fortan deziron: nepre aŭskultu la Esperantan

disaŭdigon de nia propra Patrujo!

这样，从老师、友人、刊物三条渠道，我提前得悉了我国将要开办世界语广播的消息。当时中国世界语者之间，把这件事当成喜讯互相转告。这个消息唤起我强烈的愿望：一定要收听到自己国家的世界语广播。

Aŭdkapablo. Se mi ne povas prepari min per rekta vojo tiuflanke, do laŭ kurba vojo al sama celo. Unue, mi pli ofte faru laŭtan deklamon de Esperantaj tekstoj al mi mem. Due, provu esperantigi el ĵurnaloj la gravajn novaĵojn pri kurantaj aferoj. Ĉar mi supozas ke tio estas nemankigebla en la ĉina disaŭdigo al fremdaj aŭskultantoj.

听力的准备，不能够走直线，就走曲线的路子。一是多高声朗读世界语的文章，二是自己试着翻译报纸上重要的时事新闻（因为猜想中国的对外广播一定少不了时事要闻。）

En aŭtuno de 1964, la plej gravaj novaĵoj estis la 15-jariĝa jubileo de la Nacia Tago de ĈPR, la oficiala prezento de la granda muzika-danca epopeo <Ruĝas la Oriento> en la Popola Halo, kaj la sukcesa eksplodo de la unua atom-bombo de Ĉinio en 1964-10-16. Mi kredas, ke mi pli bone komprenos tiujn novaĵojn en la Esperanto-elsendo de CRI (Pekina Radio) dank' al mia anticipa prov-esperantigo.

1964年秋天最重要的新闻是国庆15周年，大型音乐舞蹈史诗《东方红》在人民大会堂正式演出。10月16日，我国第一颗原子弹爆炸成功。我自己翻译一遍以后，再来收听，对内容会更加熟悉。

Tio vekis mian alia konjekton: Multaj el la fervoraj Esperantistaj aŭskultantoj tra diversaj landoj, kiuj ne ŝparis ĉian klopodadon por kapti tiun elsendon, celas ĉefe la Esperantan sonon, dume la enhavo de la novaĵoj

por ili estis nur duagrade gravaj (ĉar ili eble jam delonge sciis la novaĵojn de sia gepatra lingvo). Allogate de Esperanto, multaj el ili fariĝis ĝisostaj Esperanto-maniuloj. Nun CRI disaŭdigas en 59 lingvoj (49 fremdaj lingvo), sed neniu el tiuj dekoj da lingvoj posedas pli mirindan ĉarmon, pli magian sorĉon, ol Esperanto!

从这一点来推测，许多世界语听众，之所以千方百计要收听这个节目，主要的并不是想听新闻，而是想听世界语（他们有可能从自己的父母语早就听过这些新闻了）。这些人被世界语吸引，感情上达到了痴迷的程度。Esperanto的这种神奇魅力，在CRI使用的59种语言（49种外语\*）中，其他语种很难望其项背。

Siatepe en nia vivo ankoraŭ ne aperis transistora radioricevilo. En ĉiovendejoj vendiĝas nur valv-aparatoj, surtablaj, neportebblaj por mano nek libere moveblaj. Kun ju pli multe da elektronaj tuboj, despli altranga la radioricevilo estas. Radioricevilo estas luksaĵo inter la sopirataj familiaj konsumiĵoj <3 turniĝantaj kaj 1 sonanta> [noto: 3 turniĝantaj estas brakhorloĝo, biciklo kaj kudromaŝino; 1 sonanta estas radioricevilo.] Mi mem ne havas radioricevilon, kaj denove devas peti helpon de amiko.

当时市面上还没有半导体收音机问世，商店里只有电子管收音机，座式的，不能够随身携带，电子管越多越高级。是家庭的大件消费品。即“三转一响”里的“响”器。我自己没有，还是得“出门靠朋友”。求朋友的帮助。

Sed tio ne estas ordinara peto kaj helpo. Tian peton mi povis diri nur al la plej intima amiko, kiu volantas fari ĉion por vi pro amikeco. En nia dialekto de Wuhan-anoj, tia amiko estas nomata "Kompleta Amiko". Ĉar ekde 1962 jam sufiĉe populariĝis en Ĉinio la slogano ke "pri klas-bataloj ni devas averti ĉiujare,

ĉiumonate, ĉiutage!" Aŭskulti radion en fremda lingvo tre facile vekis suspekton pri "aŭskultado de malamikaj radioj". Se tia aŭskulto de radio en fremda lingvo okazis en noktmeza tempo kaj hazarde estis subaŭdita de najbaroj, tio vekus ankoraŭ pli grandan suspekton aŭ danĝeron.

但这不是一般的求助与帮助，只能向肯为朋友两肋插刀的好朋友（武汉人称之为‘整’朋友）开口。因为从1962年起，“阶级斗争年年讲，月月讲，天天讲”的教育已经深入人心，听外语广播极容易有“收听敌台”之嫌疑，如果在一个深夜的时间点让邻居听到有外语广播，嫌疑就更大。

Mia samlokano-amikino triafoje etendis al mi sian helpeman manon. Antaŭ nelonge ŝi aĉetis novan radio-ricevilon, kun tri malsamaj ondlongoj kaj unu valvo, vulgare nomata kata okulo, kiu impone flagras berile dum la radio parolas. En tiuj jaroj, kiam popolano en Ĉinio aĉetis tian potencrangan radioricevilon, la posedanto ofte unue vizitis al policejo, kie li sin anoncis kaj publike forigis la funkcion de radioricevo per mallonda ondo. Tia forigo estas por eviti alies suspekton. Ĉar en multaj tagoj aŭskultinte mian deziron aŭskulti la Esperanto-elsendon de Pekina Radio, mia samlokano-amikino decidis portempe ne fari la malvolontan kripligon al sia nova radioricevilo (ĉar ne ekzistas leĝa devigo). Sed ŝi havas novan zorgon: ĉu ni pro neglektemo malsukcesos kapti la sopiratan elsendon en urĝa momento? Ŝi do anticipa mem provis multfoje. Trovinte la celitan mallongan ondon, ŝi fiksas la ŝaltilon tamen je la mezlonga ondo tiel, ke ŝi povas konversi per ektuŝo tuj al la celita mallonga ondo.

我的同乡朋友第三次伸出援手。她刚买了一台新的收音机，三波段，带电子猫眼的那一种。当时中国人若是买了这种级别的收音机，为了避嫌，往往先到公安局去备案，剪掉短波收听功能。我的这位同乡朋

友，因为听我念叨了多日想听北京台的世界语广播，就暂时没有去办理剪掉短波的手续（法律上也没有强制性的规定）。又因为担心不能立即找到而错过这个节目，就提前测试了许多次。找准了短波之后，把收音机定在中波的位置，只要一按开关，立即转换到短波台。

Frumatene, je la 4a horo de 1964-12-19, finfine alvenas la longe sopirata tago, la longe sopirata momento. Neniu Esperantista amiko akompanas min por kune ĝui mian emocijon kaj ĝojon. Tra la vasta firmamento en nokto ekaŭdiĝis klaraj sonoroj de melodio <Ruĝiĝas la Oriento>. Jen la komenca muziko. Sekve aŭdiĝas alvokoj: "Parolas Pekino! ", "Parolas Pekino! " Alternas la vira kaj virina voĉoj, kristalaj. Sekve aŭdiĝas: "Bonan Vesperon! Karaj geaŭskultantoj, nun ni komencas nian elsendon en Esperanto! " Kvankam mi ne povis antaŭscii tiujn frazojn, tamen mi tute komprenis ĉi-momente. Poste mi eĉ memoris parkere. En subregata voĉo mi ĝojkriis en Esperanto: "Hura!" Per tio mi jubilas la sukceson de la ĉina Esp-a disaŭdigo, ambaŭflanke de la unuafoja elsendo kaj aŭskulto!

1964年12月19日凌晨4点，盼望以久的这一天，盼望以久的这一个时刻，终于来到了。我身边并没有世界语者相伴，来分享我的激动和快乐。从茫茫的夜空中传来了清脆的“东方红”的钟声，这是开始曲。然后是呼唤：Parolas Pekino! Parolas Pekino! 男声和女声交替着呼唤，声音非常之清晰。接下来是：Bonan Vesperon! Karaj geaŭskultantoj, nun ni komencas nian elsendon en Esperanto! 这几句话虽然我事先并不知道，可是此刻完全都听懂了。后来我都会背诵了。我压低了嗓门用世界语喊了一声“Hura!”用这个欢呼庆祝中国世界语广播首播和收听的成功。

En sekvaj jaroj, kune kun la reformado kaj malfermo de nia Patrujo, multe progresis la cirkonstanco en la ĉina socio. CRI ankaŭ aldonis E-elsendon al Japanio, Koreio kaj Sudorienta Azio. La horaro por ni fariĝis pli oportuna. Mi ne plu bezonas aŭskulti en profunda noktomezo.

后来随着祖国的改革开放，整个社会的环境有了很大的进步，国际台的世界语节目又增加了对日本、朝鲜和东南亚的广播，时间上对我们更加方便，不用在凌晨星夜收听。

Post multaj jaroj, mi kompilis por ĉinaj Esperanto-kursanoj lernolibron <Esperanta Elementa Kurso>. En dek jaroj ĝi havis pli ol dek eldonojn, el kiuj tiu eldonita de ĈEE 1992 jam atingis 30 milojn da ekzempleroj. En tiu libro, la 16-a leciono estas speciale pri Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino. Tiam la rimedoj por Esperanto-lernado multe boniĝis. Kursanoj povas aŭdi en klasĉambro la sonbendon de CRI. Ĉiufoje, kiam mi aŭdis la alvokon "Parolas Pekino! Parolas Pekino!", mi ĉiam rememoras pri mia unuafoja aŭskulto de E-elsendo, kaj emocio ankoraŭ bolas en mia koro.

多年以后，我为世界语讲习班编了一本《世界语初级教程》，十年之中出了十多版，仅1992年ĈEE的一个版本就印了三万多册。其中的第十六课专门介绍中国的世界语广播。这时的学习条件已经大为改善，学员们在课堂上就可以听到国际台的录音。每当我听到Parolas Pekino! Parolas Pekino! 的呼唤，总会回忆起第一次收听的情景，心潮仍然澎湃不已。

☆ Gratule al CRI

--- okaze de la 45-jariĝa jubileo de la E-elsendo  
(2009-12-19)

Pri la unua sorĉ-momento

ĝis nun mi ankoraŭ memoras:

Kiel via voko sonoras  
tra vasta ĉina firmamento

al oriento, okcidento!  
Aŭdante mi pie adoras.  
Pri la unua sorĉ-momento  
ĝis nun mi ankoraŭ memoras.

Per diligento kaj talento  
vi ĉiam fidele deĵoras.  
Rekompenco inda valoras:  
Kreskas impona monumento

ekde la unua momento.

-----

贺中国国际广播电台  
— 世界语广播开播45周年纪念

您开播那美妙的时刻，  
到今天我还记忆犹新。  
越过广袤的中国天空，  
有世界语嘹亮的播音。

北京呼唤东方和西方，  
听众虔诚地把您聆听。  
您开播那美妙的时刻，  
到今天我还记忆犹新。

您总是用天才和勤奋，  
投入工作、无比忠诚。  
杰出的成就化为丰碑，  
这纪录证明天道酬勤，

起点就从开播的时分。